KRISTNASKA NOKTO – 24a decembro 2009

HODIAŬ ESTAS NASKITA POR VI SAVANTO – Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk. 2, 1-14

En tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto, ke la tuta mondo estu registrita. Ĉi tiu estis la unua registrado, farita, kiam Kirenio estis reganto de Sirio. Kaj ĉiuj iris, por esti registritaj, ĉiu al sia urbo.

Kaj Jozef ankaŭ supreniris el Galileo, el la urbo Nazaret, en Judujon, al la urbo de David, kiu estas nomata Bet-Leĥem, ĉar li estis el la domo kaj familio de David, por esti registrita kun sia fianĉino Maria, kiu estis graveda.

Kaj dum ili estis tie, venis la tagoj por ŝia akuŝo. Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar ne estis loko por ili en la loĝejo.

Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis sian gregon. Kaj anĝelo de la Eternulo alstaris apud ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili timis per granda timo. Kaj la anĝelo diris al ili: "Ne,timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo; ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro. Kaj jen la signo por vi: vi trovos infaneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo".

Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante Dion, kaj dirante: "Gloro al Dio en la supera alto kaj sur la tero paco, inter homoj. Difavoro".

Dum la povo diigas sin mem por pli bone regi la homojn, Dio fariĝas homo por ilin savi. Estas tiu la mesaĝo de la kristnaska nokto kiun la eklezio elektis per la Evangelio laŭ Sankta Luko, la 2a ĉapitro, la naskiĝo de Jesuo.

"En tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto", temas pri Oktaviano kaj li estas la unua kiu prenis kiel kromnomon tiun de Aŭgusto, nome, "kultinda". Temas pri la povo kiu diiĝas. "Li ordonis , ke la tuta mondo estu registrita", per "mondo" oni intencis indiki la tutan loĝatan terglobon, tio estas la romia imperio. Do, estas la povo kiu diiĝas por pli bone regi la homaron, kaj super ĉio por subigi ĝin kaj por enkasigi la impostojn. Ĉar la "registrigo" utilis por tio, por pagi ĉiujn impostojn.

Kaj la evangeliisto donas al ni eĉ indikojn rilate tiun registrigon, sed tio, kion volas transdoni al ni la evangeliisto ne estas tiom historia kiom teologia raporto. La registrigo en la Biblio estis ĉiam rigardata kiel atenco al Dio, ĉar Dio estis la Sinjoro de la terglobo kaj de la homaro. Do, tie estas uzurpo kaj la movado de la Zelotoj kiel rezistado, kiel protesto kontraŭ tiutipaj registrigoj.

Nu, en tiu kunteksto, Sankta Luko skribas: "Kaj Jozef ankaŭ supreniris el Galileo, el la urbo Nazaret, en Judujon, al la urbo de David", kaj tie estas surprizo, Sankta Luko skribas: "al la urbo de David kiu estas nomata Bet-Leĥem", sed en la Biblio la urbo de David ĉiam estis Jeruzalemo, la

ĉefurbo, kie tiu ĉi reĝo komencis sian monarkion, sian regnon. Nu la evangeliisto ne konsentas, la urbo de David laŭ li estas Bet-Leĥem.

En Bet-Leĥem David estis paŝtisto, en Jeruzalemo li estis reĝo; li volas komprenigi al ni ke tiu kiu estas naskiĝonta ne havos la karakterizojn de la reĝo sed tiujn de la paŝtisto. Sankta Luko skribas ke: "Jozef devis esti registrita kun sia fianĉino Maria", kaj tie mirigas trovi tiun esprimon. La hebrea geedziĝo oni faris laŭ du periodoj: la unua estis la nupto kaj la dua estis la geedziĝo.
Nu, tie estas duopo kiu restis en la unua periodo de la geedziĝo, la nupto. Tiu termino "fianĉino" estigis grandan skandalon en la origina kristana komunumo, kaj en la kvara jarcento p.K. ĝi estis anstataŭita per la pli taŭga termino "edzino", ĉar alikaze tiu ĉi ŝajnis malregula duopo kiu ne transiris al la dua periodo de la geedziĝo.

"Dum ili estis tie, venis la tagoj por ŝia akuŝo". Ekzistas, belaj, romantikaj, sentoplenaj tradicioj pri Kristnasko, kiuj tamen riskas misprezenti la mesaĝon de la evangeliisto. Ne okazis ke dum ili atingis Bet-Leĥemon venis la tagoj por ŝia akuŝo, sed, skribas la evangeliisto "dum ili estis tie". La irvojo de Nazareto al Bet-Leĥem estis farita piede, nu, virino je siaj lastaj monatoj de gravediĝo certe ne povis trairi tiun irvojon.

Do, ili alvenis tie kiam Maria ankoraŭ povis alfronti la tutan vojaĝon. "Ŝi naskis sian unuan filon", kial la evangeliisto skribis ke tiu filo estis la unua filo? Ĉu tio signifas ke poste estos aliaj da ili? Ne. Temas pri la fakto ke "unua filo" estas la unua ido kiu devas esti foroferita al la Sinjoro - laŭ la priskribo de la libro de Eliro 13a ĉapitro versego 2. Do Jesuo estos sankta por la Sinjoro.

"Ŝi ĉirkaŭvindis lin", la detalo pri la vindoj estas rememoro pri la libro de la Saĝeco por indiki ke Jesuo naskiĝis kiel ĉiuj homoj. Fakte en la libro de la Saĝeco oni legas ke: Oni vartis min en vindotukoj kaj kun zorgoj. Neniu reĝo havis alian komencon de vivado. Ĉies eniro en la vivon estas la sama, sama la eliro". Do, Jesuo naskiĝas kiel ĉiuj la aliaj infanoj.

"Kaj ŝi kuŝigis lin en staltrogon", ankaŭ la staltrogo estas rememoro pri la profeto Jesaja, kie li diras ke "la bovo rekonas sian posedanton kaj la azeno rekonas la staltrogon de sia mastro, sed Izraelo ne konas, kaj mia popolo ne komprenas". Pere de tiuj sciigoj la evangeliisto volas komprenigi ke Jesuo, kiel jam skribas Sankta Johano la evangeliisto en sia antaŭparolo, li venis al siaj propraĵoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis, lin ne rekonis.

"Ĉar ne estis loko por ili…" en la pasinteco la maljusta traduko de la greka termino per la vorto "gastejo" kaŭzis la historion de tiu duopo kiu ne trovis lokon. "Ne estis loko por ili en la loĝejo". Normale la palestina loĝejo estas farita tiamaniere: estas parto kavigita en la roko, kiu estas la pli sana, sekura, kaj pura parto en la loĝejo, kie oni gardas la manĝaĵojn – kaj kie estas la staltrogo – poste estas masonaĵo, ununura ĉambro kie disvolviĝas la vivo de la tuta familio.

Do, tie oni kuiras, dormas kaj manĝas. Kiam virino naskas filon, laŭ la libro de Levidoj, ŝi estas malpura, do, ĉion kion ŝi tuŝas aŭ ĉiu homo al kiu ŝi alproksimiĝas ĉio fariĝas malpura kaj ŝi ne povas resti tie. Jen kial ne estas loko por ŝi en la loĝejo kaj ŝi devas iri en la internan parton de la loĝejo.

"En tiu sama regiono estis paŝtistoj". Kiam la evangeliisto prezentas al ni la paŝtistojn, li ne intencas bildigi por ni la belajn personojn de nia kripo. Tiuepoke, diras la Talmudo, neniu kondiĉo en la mondo estis tiom abomeninda kiel tiu de la paŝtisto. La paŝtistoj, malproksimaj de la civitana komunumo, ne estis pagitaj, ili vivis per ŝteloj, ili ne ĝujs je civilaj rajtoj. Ili ne povis eniri la sinagogon aŭ la templon por pekliberiĝi, ili estis la emblemo, la bildo de la malpura pekulo. Por ili ne ekzistis savo.

Nu, kiam venos la mesio, tiuj paŝtistoj kune kun la impostistoj estos la unuaj el la listo de la forigenduloj. La evangeliisto skribas ke: ”Anĝelo de la Eternulo”, estas la tria fojo kiu aperas tiu persono. Per “Anĝelo de la Eternulo” oni neniam intencas mencii anĝelon senditan de la Eternulo, sed temas pri Dio mem kiam Li interkomunikas kun la homojn. Do, la dirmaniero “anĝelo de la Eternulo”, kaj en la Malnova kaj en la Nova Testamento, ĉiam indikas la Sinjoron kiam Li ekrilatas kun kun la homoj.
Li aperas la trian fojon, kaj ĉiam rilate la vivon. La unuan fojon por anonci la vivon de Sankta Johano la Baptisto al la patro, al Zeĥarja; la duan fojon por anonci la vivon de Jesuo al Maria kaj nun por anonci la Savanton al la paŝtistoj.

“Li alstaris apud ili”. Tiu anĝelo de la Eternulo en la Malnova Testamento estis prezentita kun la glavo elingita, preta puni la pekulojn. Nu, kiam Dio sin prezentas apud la pekuloj, Li ilin ne minacas, ne ilin punas, ne ilin fulmmortigas, sed – jen la novaĵo, ĝi estas la Bona Novaĵo de Jesuo- “La gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili”.

Sankta Luko dementas la tutan antaŭekzistantan teologion pri iu Dio kiu juĝas, kiu minacas aŭ kiu punas. Kiam Dio renkontiĝas kun la paŝtistoj nenion alian Li faras ol brili ĉirkaŭ ili per sia lumo, per la lumo de Sia amo. Sed la paŝtistoj tion ne scias, kaj fakte, skribas la evangeliisto “ili timis per granda timo”, ĉar ili sciis tion kio ilin atendis, sed la anĝelo diris al ili “Ne,timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo”, la granda ĝojo de la Bona Novaĵo forpelas la grandan timon.

Kaj kiu estas la granda ĝojo? Ĝi estas ke “hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David”, kiu estas naskita? Ĉu la ekzekutisto? Ĉu la skurĝisto? Ne! “estas naskita Savanto”. Jesuo ne estos juĝisto, sed Li estos Savanto. Je la fino de tiu parolado, jen la evangeliisto skribas ke “Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante Dion, kaj dirante: “Gloro al Dio en la supera alto”, nome la videbla revelacio kiu estas fora en la supera alto, estas ke sur la tero estu paco, tio estas ĝojo al kiu?

La malĝusta traduko en la pasinteco estis “al la homoj de bona volo”. Do ĝi estis traduko kiu baziĝis sur la merito: la homoj kiu meritas, tiuj ricevas, tiuj kiuj ne meritas tiuj ne ricevas. Ne! La amo de Dio kiu sin montras pere de la deziro ke la homoj estu plene feliĉaj koncernas la tutan homaron ĉar ĉiu homo estas amata de la Sinjoro.

Ekzistas neniu homo – tiu estas la mesaĝo – kia ajn estu liaj vivkondiĉoj kaj sinteno, kiu povu sin senti ekskludita de la amo de Dio.

Ĝojan Kristnaskon!